# Leciono 10

(Enkonduko por la ekzercoj pretigitaj por la kompleto ***Pasporto al la tuta mondo***)

### *Resumo de la rakonto:*

Laŭ peto de la komitato, Ruselo, konsultinte Jarlibron, verkas kaj sendas al eksprezidanto de UEA peton oficiale malfermi kafejon Zamenhof. Kiam John Wells rete respondas "jes", ĉiuj rapide finpreparas la kafejon por la malfermo. La detektivo trompe pruntedonas falsitan monon al Georgo por la kafejo. Ho ve! Ken ricevas oferton reveni al Japanio kaj ekesti ĉef-raportisto. Flora konvinkas lin ke ŝi deziras iri kun li, kaj Jolanda geedzigas ilin dum la malfermo. Karlo suferas plue, kaj verkis am-poemon, kiun li perdis. Karlo ne partoprenas la malfermon, nek manĝas el la fifama kuko, preparita laŭ "recepto por katastrofo."

### *Resumo de la rakonto laŭscene:*

**Scenoj 1 kaj 2:** Ruselo portas la invitleteron kun li verkis al Georgo, sed tiu malfacile restas veka. En Jarlibro Ruselo trovas ret-adreson de prof. Wells, do fulm-rapide iros la invito.

**Sceno 3:** Flora kaj Ken mis-aranĝas la kafejajn meblojn. Ili anoncas al Filisa: ili gefianĉiĝis.

**Sceno 4:** Karlo estas kor-rompita. Li decidas veki poemon.

**Sceno 5:** Ruselo portas al Ken leteron, kiu alvenis el Japanio.

**Sceno 6:** La falsbarbe kaŝita detektivo vizitas Georgon, kiu imagas lin fantomo de Zamenhof. La detektivo proklamas sin hejmbankisto, preta prunti al Georgo monon por meblaro.

**Sceno 7:** Georgo insistas, ke Karlo akompanu lin aĉeti meblojn. Karlo ne volas iri ĉar li fariĝis temperamenta verkisto.

**Sceno 8:** Flora estas kontenta. Filisa malkontentas pro la melankolio de Karlo, kiu ne plu kuras kaj sportas.

**Sceno 9:** Ruselo trovas la ret-respondon de prof. Wells. Li venos post du tagoj.

**Sceno 10:** La letero por Ken enhavas bonan oferton por la posteno de ĉefraportisto en Tokio. Flora konsentas iri al Japanio kaj tie malfermi vendejon.

**Sceno 11:** Ruselo trovas ampoemon en la ĝardeno kaj prenas ĝin.

**Sceno 12:** Ken kaj Flora diras sian sekreton al Jolanda, por ke ili anoncu ĝin publike dum la malfermo de la kafejo.

**Sceno 13:** Filisa direktas la preparlaborojn por la malferma festo.

**Sceno 14:** Fine, ĉio pretas kaj gastoj babilas ĝoje. John Wells alvenas kaj tranĉas la kukon por solene malfermi la kafejon. Ken kaj Flora anoncas sian sekreton: la kafejon ili transdonos al la familio Bonvolo. Antaŭ Jolanda ili faras sep sanktajn ĵurojn por ke ŝi deklaru ilin perfekta Esperanta paro.

### *Gramatikaj temoj:*

La sufikso *-em-* kiu signifas *inklina al*. Filisa estas puŝema. Ŝi tendencas puŝi homojn.

Ni povas uzi korelativojn en paroj: *tiom-kiom; tiel-kiel; tiam-kiam*. Ekzemple: La hejmbanko pruntas monon, tiom kiom vi deziras. La filozofo estas tiom surda, kiom la detektivo.

*Kio* estas konata al vi kiel demando-vorto, sed ĝi povas ankaŭ ligi du frazojn. En tiu kazo ĝi havas rilatigan funkcion. Foje, ĝi bezonas la formon *kio* foje *kion*, depende de la transitiveco de la verbo al kiu ĝi rilatas: Ekzemple:

> Mi ne scias kion li portos. (*porti* estas transitiva: li portos ion.)
> Mi ne scas kio aperos. (*aperi* estas netransitiva. io aperos.)

Ankaŭ *Kiu* povas havi rilatigan funkcion. Legu pri tio sur la sekva paĝo.

### *Esperantaj temoj:*

Uzo de Jarlibro; poeto Kalocsay kaj la poemo *Streĉita Kordo*; "Esperanta" geedziĝceremonio (Libro de Amo); verdaj steloj; ŝercoj pri prononcado, gramatiko, kaj aliaj esperantaĵoj, La esperanta himno: *La Espero.*



# Gramatikaĵo, kiun vi ne konis ĝis nun

Vi konas la vorton "Kiu" kiel demando-vorton: "Kiu vidis la tranĉilon?" Sed tiu vorto povas aperi ankaŭ meze de frazoj. En tiu kazo, ĝi ne havas demandan, sed rilatigan funkcion. Gramatike, ni nomas tion la *rilativa* funkcio de la korelativo. Ĝi permesas al ni ligi du frazojn. Ekzemple:

La fantomo aperis antaŭ Georgo. La fantomo havas barbon.
➔ La fantomo, kiu aperis antaŭ Georgo, havis barbon.

En nia ekzemplo, la unua fariĝas la ĉef-fraz-parto, la dua la intermetita frazparto.

*Kiu* rilatas al iu vorto en la ĉef-frazo. Se tiu vorto estas plurala, uzenda estas *kiuj*.

*Kiu* rilatas al verbo en la intermetita fraz-parto.

- Se ĝi estas la subjekto de tiu verbo, la akuzativa finaĵo ne aperu ĉe *kiu*.
- Se ĝi estas la objekto de tiu verbo, la akuzativa finaĵo aperu ĉe *kiu*.

| Ekzemplaj frazoj | *kiu_* rilatas al | -j ? | *kiu_* estas la… | -n ? |
|---|---|---|---|---|
| La fantomo, kiu aperis, havas barbon. | La fantomo. | Ne | subjekto de la verbo *aperas*. | Ne |
| La gastoj, kiuj venis, estis entuziasmaj. | La gastoj | Jes | subjekto de la verbo *esti*. | Ne |
| La kuko, kiun John tranĉis, estis avangarda. | La kuko | Ne | objekto de la verbo *tranĉi* | Jes |
| La monbiletoj, kiujn Georgo ricevis, estis strangaj. | La monbiletoj | Jes | objekto de la verbo *ricevi* | Jes |
| Filisa bakis la kukon, kiun John tranĉis. | La kukon | Ne | objekto de la verbo *tranĉi* | Jes |
| Filisa bakis la kukon, kiu estas moderna | La kukon | Ne | subjekto de la verbo *esti*. | Ne |
| Filisa bakas kukojn, kiuj estas modernaj. | Kukojn | Jes | subjekto de la verbo *esti*. | Ne |
| Filisa bakas kukojn, kiujn oni manĝas. | kukojn | Jes | objekto de la verbo *manĝi* | Jes |

Foje la rilatiga ***kiu*** rilatas al ***iu, iuj, iun*** aŭ ***iujn***. La bezono por ***-n*** ĉe ***kiu*** estas decidita laŭ la transitiveco de la verbo en la intermetita frazparto (en la unua ekzemplo, *kuros*) kaj ne laŭ tiu en la ĉef-parto (en la unua ekzemplo, *bezonas -on*). Vidu pliajn ekzemplojn:

| Ekzemplaj frazoj | *kiu_* rilatas al | -j ? | *kiu_* estas la… | -n ? |
|---|---|---|---|---|
| Ni bezonas iun, kiu fulme kuros. | iun | Ne | subjekto de *kuros*. | Ne |
| Necesas iu, kiu fulme kuros. | iu | Ne | subjekto de *kuros*. | Ne |
| Ni serĉas iun, kiun ni povas fidi. | iun | Ne | objekto de *povas fidi.* | Jes |
| Ĉu aperos iu, kiun ni povos fidi? | iu | Ne | objekto de *povas fidi.* | Jes |
| Ni bezonas iujn, kiuj fulme kuros | iujn | Jes | subjekto de *kuros*. | Ne |
| Necesas iuj, kiuj fulme kuros. | iuj | Jes | subjekto de *kuros*. | Ne |
| Ni serĉas iujn, kiujn ni povas fidi. | iujn | Jes | objekto de *povas fidi.* | Jes |
| Ĉu aperos iuj, kiujn ni povos fidi? | iuj | Jes | objekto de *povas fidi.* | Ne |